

# juna amiko

novembro 2019 • n-ro 4/2019 (161)



PROGRESIGA REVUO  
POR LEGANTOJ  
INTER 10- KAJ  
100-JARAĜAJ

*Renesanca geniulo: Leonardo da Vinci.*  
*Konversaciaj temoj: La utileco de komputilo.*  
*Nature: Vertebruloj. Akvo, nia trezoro.*  
*Bluĝinzoj. Lude: Kion koro portas, vizaĝo*  
*raportas. Interkultura Mondo: Kulturdomo*  
*de Esperanto en kastelo Greziljono. Ferii kaj*  
*lerni: AMO refoje gastigita de NASK en Usono.*

# Klaŭdia

Aŭtorino: Sonmy Álvarez

Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco



Vidu mian novan luddometon... Ĝi havas multajn kolorajn lampetojn, butonojn por malfermi la fenestrojn... kaj vi povas aŭdi muzikon...





# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK);

Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) ..... 4



**Konversaciaj temoj:** La utileco de komputilo

(Judit Felszeghy, HU) ..... 5



**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 9

**Nature:** Vertebruloj (José de J. Campos Pacheco, CU) ..... 10



Akvo, nia trezoro (Renée Triolle, FR) ..... 11

Bluĝinzoj (Renée Triolle, FR) ..... 12



**Kantu kun Juna Amiko:** En nokto de vintra solstico (Małgosia Komarnicka, PL/Luiza Carol, IL) ..... 13

Unesko uzos Esperanton en festivalo (GaKo) ..... 14



Festivalo de vinberkultivistoj (Mireille Grosjean, CH) ... 15



**LUDE, la unika dua etaĝo:** Kion koro portas, vizaĝo raportas (Mónika Molnár, CH) ..... 16



**Renasanca geniulo:** Leonardo da Vinci en Britujo (Renato Corsetti, GB) ..... 18



**Recenzo:** Svisa poem-rakonto *Sonoril-Urĉjo* (Luiza Carol, IL) ..... 21



**Legu librojn – premioj – konkursoj:** Klubo de bona libro. Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo. (Małgosia Komarnicka, PL /Luiza Carol, IL)..... 22

**Pontoj:** Nepalo, montara lando, bezonas pontojn (Mireille Grosjean, CH) ..... 30



**Interkultura Mondo:** Kulturdomo de Esperanto en kastelo (Elena Nadikova, RU/Bert Schumann, FR) ... 31

**Geniaj junuloj:** Hector Hodler (Mireille Grosjean, CH) ..... 34

Marie Marvingt (Renée Triolle, FR) ..... 35



**Ferii kaj lerni:** AMO refoje gastigita de NASK en Usono (Derek Roff, US) ..... 36

Nova forumo por UEA-membroj (GaKo) ..... 37



**LASTE, la tria etaĝo:** Kongreso en Oceanio (Stefan MacGill, NL/HU) ... 38


**Eldonanto de Juna amiko:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe [ilei.mondo.info](http://ilei.mondo.info). Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ [lernu.net](http://lernu.net) kaj [edukado.net](http://edukado.net). **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Maier (Germanio) kaj Rob Moerbeek (Nederlando). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, [ilei.officejo@gmail.com](mailto:ilei.officejo@gmail.com). **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en februaro 2020. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318

## Karaj amikoj!

**S**ur la frontpaĝo de tiu ĉi numero vi certe rekonis la faman pentraĵon *Mona Lisa* de la itala renesanca geniulo, forpasinta antaŭ 500 jaroj, Leonardo da Vinci. Vi legos, ke li estis ne nur pentristo, sed ankaŭ skulptisto, arkitekto, inĝeniero, inventisto kaj filozofo. Ankaŭ pri aliaj *Geniaj Junuloj* Hector Hodler kaj Marie Marvingt vi povos legi en tiu ĉi numero.

En la rubriko *Konversaciaj temoj* vi ekscios pli pri utileco de niaj komputiloj, via mondo fariĝos pli kolora danke al la rubrikaj *Lume*, en la rubriko *Nature* vi lernos pri vertebruloj kaj senvertebruloj – kaj pri tio, kia trezoro estas la akvo. Vi povos denove kanti kun Luiza Carol, celebri laboron de vinberkultivistoj en Svislando kun la handikapita junulino Sofia. Batali kontraŭ tristeco kaj admiri belajn bildojn de la svisaj lernantoj



en la lernejo La Granda Ursino en la urbo La Chaux-de-Fonds vi povos en la rubriko *LUDE*. Ne mankos *Recenzo* pri interesa kaj bele ilustrita svisa poemorakonto por infanoj pri malnovaj domoj, vestaĵoj, la naturo kaj sonoriloj en la svisa regiono Engadino. En la rubriko *Legu kaj ĝuu* vi legos pri “Nobel-premio pri Literaturo”, pri la fabelo *La mirinda vojaĝo*, pri la vizitinda lando Israelo kun la vilaĝo Pacoazo, pri malnovaj judaj legendoj kaj la reĝoj

Davido kaj Solomono. Pri problemoj de homoj en Nepalo kaj ke ili bezonas nian helpon, speciale pontojn por pli bone vivi en montaroj rakontos al vi Mireille Grosjean. La rubriko *Interkultura Mondo* gvidos vin al Kulturdomo de Esperanto en la kastelo Greziljono kaj *Ferii kaj lerni* vi povos dum AMO-seminario (Aktivula Maturigo) en Usono. Agrablan jarfinon, belajn Kristnaskajn festojn kaj tre sukcesan jaron 2020!

Via redaktoro **Stano Marček**

## Karaj legantoj!

**M**i ne scias, kiu personeco el tiu ĉi kajero de *Juna Amiko* plej multe mirigas min. Ĉu Leonardo Da Vinci kaj lia inventemo kaj multifaceta talento? Ĉu Marie Marvingt kaj ŝia kuraĝo kaj energio? Ĉu Selma Lagerlöf kun ŝia verkista laboro? Ĉu Hector Hodler, kiu kreis Universalan Esperanto-Asociacion kaj gvidis ĝin, estante tute juna, kiam la esperantistaro estis simpla amikaro ĉirkaŭ Zamenhof? Legante pri ili ni ekkonas iliajn talentojn, energion, exploremon, kaj tio gvidas nin, spronas nin, kuraĝigas nin. Ili fariĝas modeloj, ili instigas nin, ili inspiras nin.



Legante tiun ĉi kajeron de *Juna Amiko* ni denove havas la okazon viziti plej diversajn landojn en Azio (Israelo, Nepalo), Eŭropo (Svedio, iom pri Italio kaj Britio, Svislando, Francio), Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kaj Ameriko (Usono).

Niaj kontribuantoj same troviĝas en diversaj kontinentoj: Jose de Jesus Campos Pacheco estas kolego el Kubo, Luiza Carol el Israelo, kaj la aliaj el diversaj eŭropaj landoj: granda danko iru al ili, kiuj nutras nian karan revuon regule, efike kaj pozitive. Kaj laste ni menciuj kaj danku la provlegantojn el Japanio, Doi Ĉieko, el Armenio Karine Arakeljan, el Germanio Utho Maier kaj el Nederlando Rob Moerbeek.

**Mireille Grosjean**



# La utileco de komputilo

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

## I. Por kio necesas nova komputilo?

**Patrino (P)** babilas kun sia dek-jara filo Niĉjo (N), hejme, iun posttagmezon, komence de la lernojar.

N – Mi jam ne povas prepari miajn hejmtaskojn per tiu ĉi komputilo!

P – Kial ne? Tiu ĉi estas ankoraŭ tre bona maŝino! Via patro pagis por ĝi multon siatempe!

N – Jes, Panjo! Siatempe! Sed ĉu vi scias, antaŭ kiom da jaroj?

P – Ho, tio tamen ne okazis antaŭ longe! Vi jam vivis tiam, fileto

mia! La printilon kaj la skanilon ni aĉetis antaŭ tri jaroj. Sed kio pri via hejmtasko? Kial ne eblas fari ĝin? Eble mi povas helpi vin!

N – Ha, Panjo! Mi bezonas diversajn datumojn tra la reto, sed la komputilo de Paĉjo estas jam tute maltaŭga por tia tasko. Do, diru al mi bonvole, kiuj estas la plej alta monto, la plej longa rivero, kaj la plej granda lago en la mondo!

P – La monto estas Ĉomolungmo, en la montaro Himalajo, la plej longa rivero estas Nilo en Afriko, kaj la plej profunda lago estas Bajkalo en Siberio, sed la plej vasta eble la maro Kaspio. Kaj mi tuj diros al vi ankaŭ kiom grandaj ili estas! Ĉu vi ne sciis,





ke ni havas ankaŭ leksikonon sur la librobreto?

N – Panjo, vi ja scias ege multe! Dankon! Sed tamen tiu komputilo ne estas bona. Mi ofte bezonas ankaŭ pliajn aferojn, korespondadi rete pri la hejmtasko, aliĝi al la hejmpaĝo de la lernejo kaj simile.

P – Bone, fileto, mi parolos kun Paĉjo, kaj ni vidos, kiom da mono ni povos liberigi. Sed, ĝis tiam, povu prepari vian hejmtaskon, kaj foje vi povas uzi eĉ skribilon kaj kajeron!

## II. Por kio eblas uzi la novan komputilon?

Post kelkaj semajnoj Niĉjo (N) kaj Karina, juna knabino (K) babilas rete:

N – Ĉu vi aŭdas min bone, Katido?

K – Jes, Niĉjo, perfekte! Bone, ke vi akceptis mian proponon, kaj uzas kapaŭskultilon! Kiam vi uzis la mikrofonon kaj la laŭtparolilon de via antaŭa komputilo, mi ĉiam aŭdis la eĥon de mia propra voĉo.

N – Pli frue mi uzis laŭtparolilon kun la malnova surtabla komputilo de mia patro. Kiam mi volis aŭskulti muzikon, tio estis aŭdebla tra la tuta loĝejo! Mia tekkomputilo havas propran laŭtparolilon.

K – Mi ĝojas, ke nun mi povas aŭdi senĝene vian voĉon, kaj ni ne devas tajpadi por diri ion unu al la alia. Miaj fingroj jam ekdoloris pro la daŭra frapado sur la klavaro!

N – Katido, pli frue vi parolis pri interesa





ludprogramo. Ni povus kune aliĝi al tiu reta ludprogramo, ĉu?

K – Mi jam havas konton en kelkaj, kaj inter ili estas iu tute bona. Mi povas helpi vin, se vi emas ludi. Oni povas elekti rolfiguron.

N – Kio tio estas? La rolfiguro, aŭ kio.

K – En tiu ludo oni povas aperi, movi, marŝi virtuale, ĉar vi movas iun virtualan estaĵon. Mi, ekzemple, aperas kiel malgranda kato...

N – Aha, do tial vi nomiĝas „Katido”, ĉu?

K – Ĝuste! Ankaŭ vi povas elpensi, en kiu formo vi aperu en la ludo. Krome, elpensu por vi iun uzantnomon aŭ kaŝnomon, kaj la aliaj ludantoj konos vin tiel.

N – Tio sonas ege interesa! Mi nepre deziras ludi!

K – Do, ni alŝutu la programon! Cetere, en ĝi partoprenas multaj esperantistoj, kun kiuj ni ĉiutage povas voĉe babilo... Jen la ligilo... El inter la lingvoj elektu Esperanton...

N – Mi faris, kaj kio sekvas nun?

K – Nun, meze, en la flavan fenestron entajpu vian kromnomon, kaj poste vian pasvorton. Kiam vi pretas, klaku por aprobi!

N – Jen mi pretas! Ho, kiel interese estas ĉi tie! Videblas kasteloj, montoj...

K – Ankaŭ la virtuala ĉirkaŭaĵo aspektas tre realece en la ludo. Mi jam akiris novan video-karton, kaj per ĝi sur la ekrano ĉio aperas tiel, kiel sur fotoj!

N – Mi pensas, ke mi oftege enretiĝos kaj ĝuos tiun ludon! Kioma horo nun estas? Ho ve! Baldaŭ la gepatroj hejmenvenos el la teatro, kaj mi ankoraŭ ne preparis mian hejmtaskon! Ĝis baldaŭ Katido, kaj dankon por ĉio!

K – Notu nepre viajn salutnomon kaj pasvorton, por ke vi povu enretiĝi morgaŭ! Ĝis baldaŭ!

### III. Por kio estis utila la nova komputilo?

**Post kelkaj monatoj Niĉjo (N) kaj Karina (K) babilas rete, poste Niĉjo parolas kun sia patrino (P), kaj ŝi al la patro de Niĉjo (PN).**

K – Saluton Niĉjo, mi jam atendis vin! Ĉu ni daŭrigu la babiladon skajpe, aŭ ni ŝanĝu al la ludo?

N – Saluton Katido! Unue mi devis fini miajn hejmtaskojn, Paĉjo decidis kontroli ilin.

K – Ankaŭ mi havis multe da hejmtaskoj nun, eble pro la vintraj ferioj. Kiun lernejon vi vizitas?

N – Ĝi estas 12-klasa lernejo, nomita Hector Hodler; ĝi troviĝas...

K – Ho, ĉu vere? Mi frekventas la saman lernejon! Ĝi staras tuj malantaŭ iu granda parko, kaj ĝi troviĝas tute proksime al nia hejmo.

N – Mi certe konas tiun parkon. En ĝi estas multaj malnovaj arboj kaj tre bonaj lokoj por ludi! La lernejo staras ĉe ĝia maldekstra flanko. Mi ofte rigardas la arbojn tra la fenestro de la klasĉambro, dum la lecionoj.

K – Rigardu, mi sendas al vi la ligilon de la Guglo-mapo pri la parko. ... Tie videblas la parko kaj ankaŭ la lernejo.

N – Jes, mi vidas! Se mi ruligas la muson por malproksimiĝi, mi vidas eĉ la straton Abelo, kie ni loĝas!

K – Niĉjo, vi ja loĝas en la sama strato kiel ni! Kaj vi vizitas eĉ la saman lernejon! Eble...

N – Katido, kio estas via vera nomo? Ĉu vi ne emas malkaŝi tion al mi?

K – Mi estas Karina Belmonto. Kaj ĉu ne vi estas Nikolao, tiu alta knabo el la klaso 5b?

N – Karina, ni jam vidis foje unu la alian! Vi loĝas en la sama domo, kie ankaŭ ni, en la tria etaĝo, ĉu? Ĉu ni ne iru nun al la parko, kie ni povas iom ludi tie? Ne estas ankoraŭ tro malhele!





- K – Jes, mi povos, mi konsentas...  
Sed jam neĝas, rigardu eksteren!
- N – Ne gravas! Mi tre ŝatas neĝadon!  
Rapidu, mi atendos vin sube, ĉe la enirejo!
- N – (Forirante, al la patrino) – Panjo, mi iros ankoraŭ iom eksteren, al la parko, dum estas hele ekstere.
- PN – Bone Niĉjo, antaŭ unu horo vi diris tamen, ke vi ankoraŭ havas tre multon por fari ĉe la komputilo.
- N – Mi jam finis ĉion, Panjo! Ĝis baldaŭ!
- P – Ĝis, fileto! Ne tro malfruu tamen!  
(al Patro) – Kio okazis? Jam de monatoj li tute ne emis ekstari de la komputilo; li daŭre sidas ĉe la tablo kaj gvatas\* la ekranon!
- PN – Eble nun li havas ne tiom multajn hejmtaskojn! ... Kaj li trovis iun pli interesan okupon.

\* Gvati = kaŝe observi

## TASKOJ

- I. Legu atente la dialogojn, trovu la nekonatajn vortojn en la vortaro, kaj poste legu la tekston denove!
- Kolektu la vortojn pri komputilo kaj komunikado!
  - Kontrolu, kiuj komunikiloj estas en via hejmo, aŭ en via lernejo (laborloko)!
- II. Imagu, ke la unuan fojon vi babilas aŭ korespondas rete kun iu. Prezentu vin al ŝi/li!
- Kompilu dialogon en 4 – 6 frazoj, en kiu vi invitas vian konatulon al iu interreta programo aŭ/kaj ludo!
- III. Klarigu al via konatulo, kiel uzi iun retan programon por babili (ekzemple Skajpon)!
- Esprimu vian opinion (aŭ skribu letere), ĉu la teĥnika evoluo de la telekomunikado helpis la homajn rilatojn aŭ inverse,
  - kaj aldonu ankaŭ viajn argumentojn, kial!







# El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, beston kaj homojn! Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, besto kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo?



**Kolorigu! Trovu la 18 diferencojn!**



José de Jesús Campos Pacheco:

# Vertebruloj

Vertebro estas osto, malmola parto de la korpo. Vertebruloj (latine *vertebrata*) estas animaloj, kies spino (tuto de la ostoj) konsistas el vertebro. Senvertebruloj (*invertebrata*) estas bestoj sen vertebro. Ili havas molan korpon, ĉar mankas la interna skeleto.

## Vertebruloj

### Mamuloj

estas varmsangaj, havas kvar membrojn kaj harojn. Ili havas pulmojn, estas naskitaj vivaj, nutras sin per patrina lakto kaj ĝuas prizorgon de la gepatroj.

### Birdoj

estas varmsangaj, havas du krurojn kaj du flugilojn kaj plumojn. La idoj elkoviĝas el ovoĵ en nesto kaj la gepatroj nutras ilin.

### Reptilioj

estas malvarmsangaj, havas kvar krurojn (de serpentoj ili jam antaŭlonge malaperis) kaj estas skvamkovritaj (*skvamo = lamneno sur haŭto*). Ili havas pulmojn. La idoj elkoviĝas el ovoĵ, metitaj sur la teron, aŭ naskiĝas vivaj, kaj kapablas sin prizorgi.

## Amfibioj

estas malvarmsangaj, havas kvar krurojn kaj nudajn korpojn. La idoj elkoviĝas el fraĵoj (etaĵ ovoĵ) en akvo kaj evoluas kiel brankuloj, kiuj kapablas sin prizorgi. Poste aperas pulmoj kaj kruroj kaj la bestetoj forlasas la akvon.

## Fiŝoj

estas malvarmsangaj, havas naĝilojn kaj brankojn kaj estas skvamkovritaj. La idoj elkoviĝas el fraĵoj (tamen iuj naskiĝas vivaj) kaj kapablas sin prizorgi.

## Senvertebruloj

### Insektoj

havas tripartan korpon kun ses kruroj kaj kutime kvar flugiloj. Ili loĝas surtere kaj spiras aeron. La idoj elkoviĝas kiel larvoj, evoluas kiel nimfoj kaj fine maturiĝas.

### Moluskoj

havas molajn korpojn kaj loĝas sur la tero aŭ en la akvo. Iuj estas protektataj de ŝelo kaj moviĝas sur speco de piedo. Ili demetas ovoĵn.

### Krustuloj

havas multepartan korpon, multajn krurojn kaj malmolan ŝelsimilan haŭton. Plej ofte ili loĝas en la maro kaj kapablas spiri sub la akvo. La idoj elkoviĝas el ovoĵ.

### Anelidoj

estas vermoj kun longaj korpoj, kies segmentoj aspektas kiel ringoj. Ili demetas ovoĵn kaj loĝas en la tero aŭ en la maro.



Vertebruloj

Senvertebruloj



Renée Triolle:

# Akvo, nia trezoro

Eble vi loĝas en lando, kie sufiĉas malfermi kranon por havi tuj varman aŭ malvarman trinkeblan akvon.



**S**ed pensu, ke en multaj landoj knabinoj devas iri 6 horojn tage por trovi akvon kaj porti ĝin hejmen, aŭ infanoj malsaniĝas, ĉar ili trinkis netrinkeblan akvon, ludis en ĝi kaj kaptis diversajn haŭt-malsanojn, aŭ lakson aŭ marĉ-febron.

Sciencistoj kalkulas, ke en 2030 mankos 40% de la necesa akvo! Akvo servis por difini temperaturon: kiam ĝi bolas, estas 100°C, kiam ĝi frostas estas 0°C. Ĝi havas tri aspektojn: likva (rivero, maro), solida (glaĉero, bankizo) kaj gasa (nebuloj).

## Al kio servas akvo?

**Al trinkado kaj manĝado:** (5% de nia konsumado, sed homo ne povas vivi pli ol 3 tagojn, se li ne trinkas). Efektive nia korpo konsistas 65% el akvo, ĉe bebo 75%. Cerbo, pulmoj, koro, renoj, sango, muskoloj ktp konsistas ĉefe el akvo; nur dentoj konsistas nur el 10% da akvo. Ĉiutage vi devas trinki 1,5 litrojn da "akvo" (akvo, teoj, suko), al kio aldoniĝas la "akvo" el supo kaj legomoj.

**Al homaj bezonoj:** lavado, purigado, necesejo;



**Al agrikulturo:** necesas akvumi legomojn, cerealojn, fruktojn, por ke ili pli multe produktu nutraĵon por la sep miliardoj da loĝantoj;

**Al bredado:** bestoj trinkas (ekz. bovino 50 litrojn tage), sed por ke ili pli bone produktu viandon, nun oni akvumas la herbejojn.

**Al industrio:** ne nur ĉe atomcentralo, sed en produktado de ŝtofoj, metaloj ktp.

## Ne polui kaj recikligi

Agrikulturo kaj industrio poluas akvon. La elĵetaĵoj iras al riveroj, poste al la maro kaj poluas la nutraĵojn de fiŝoj aŭ marestaĵoj, aŭ al la grundo (ĉefe pri bredado de porkoj, kokidoj ktp) kaj aldonas nitratojn, fosforojn kaj kemiaĵojn, kiuj nutras herbaĉojn aŭ algaĉojn, kiuj poluas la marbordojn.

En riĉaj landoj imposto estas aldonita al la prezo de akvo kaj servas al purigado kaj reciklado de akvo. En malriĉaj landoj ofte poluita akvo iras simple al la tero aŭ stagnas. Tio kaŭzas malsanojn (vidu supre). Helpo estas provizita por konstruo de tiuj purigejoj, sed pro korupto, la mono iras en la poŝojn de malhonestuloj, ne al konstruado!

Kiel kutime, plej bone estas ne polui kaj ĉefe ŝpari!

## Kion mi faru por ŝpari akvon?

Fermu la kranon dum vi lavas la dentojn, la manojn, la telerojn;

"Kaptu" malvarman akvon, kiu iĝos



varma kaj uzu ĝin poste;

**Duŝu vin** anstataŭ bani vin;

**Lavu legomojn** en ujo, kaj poste akvumu la plantojn per ĝi.

**Kolektu pluvakvon** en diversajn ujojn kaj poste akvumu plantojn, aŭ lavu la aŭton de viaj gepatroj.



**Se vi plurope vizitas necesejon** por pisi, nur la lasta forlavos ĝin (ekzistas “sekaj” necesejoj, sed malofte en urboj. Se vi havas ĝardenon, konstruu kaj uzu sekajn necesejojn).

**Konklude**, faru tion, kion faris viaj praavinoj, kiam ili devis piediri al fontano kaj porti hejmen pezajn kruĉojn!

Renée Triolle:

## Bluĝinzoj

**Tiuj pantalonoj tutmondiĝis: eĉ en varmaj landoj, kie la tradiciaj pantalonoj estis larĝaj kaj malpezaj por ebligi al la aero trablovi, nun junuloj nepre surhavu ĝinzojn.**

**A**nkaŭ junaj infanoj, knaboj kaj knabinoj, surmetas ilin; tiel ke kuracistoj konstatis, ke knabinoj ŝanĝis sian starmanieron, pro la tro ofta surmeto de tiuj neelastaj pantalonoj.

Unue ili estis faritaj en Nimes, romia urbo de suda Francio, kiu donis la nomon “denime” kaj utilis al laboristoj. “Bleu de Gênes”, blu-ĝinzo, rilatas al la koloro.

Nun ili iĝas pli kaj pli komplikaj, kun brodaĵoj, diversaj koloroj, kaj sekvas modon!

Por fabriki ĝinzojn necesas inter 7 000 kaj 10 000 litroj da akvo (kreskigo de kotono, tre “akvomanga”, al kio

aldoniĝas lavado kaj tinkturo (kolorigo). Tiu konsumado egalas 285 akvoduŝojn.

Sed tio ne estas la sola poluado: por kolorigi ilin, necesas acido, ĉefe sulfata, kiu poste iras al riveroj. Ne malofte riveroj apud fabriko iĝas ruĝaj, bluaj aŭ flavaj. Uzo de sablo estas malpermesita de du jaroj.

Se fabrikado estas malbona por la naturo, ĝi estas ankoraŭ pli malbona por la laboristoj, ofte infanoj aŭ rifuĝintoj, kiuj laboras 12 horojn tage kaj sep tagojn semajne.

Tro ofte laboristoj suferas pro spir- kaj haŭt-problemoj. Feliĉe kelkaj produktantoj konscias pri la problemoj kaj provas ŝanĝi

la fabrikmetodon, por ke ĝi estu pli favora al la naturo, ekzemple kaptas la karbonan dioksidon, provas ŝpari akvon ĉe lavado, uzas biologie produktitan kotonon, aŭ parte cikligitan, miksas kotonon kun aliaj fibroj, kiuj kreskas kun malpli da akvo.

Sed la aĉetantoj, do vi, iĝu pli konsciaj, ne forjetu eksmodajn, uzu ilin ĝis foruzo, provu redukti la nombron de produktitaj ĝinzoj. Kaj ankaŭ pretu pagi pli por ĝinzoj pli ekologie produktitaj!





# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun

agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi rekomendas la kanton *En nokto de vintra solstico* (sunreveno, 21. dec.), al kiu vortojn kaj muzikon preparis al la legantoj de *Juna Amiko* Luiza Carol, israela esperantistino kaj longdaŭra kunlaboratino de nia revuo. Mi elektis tiun kanton pro belaj vortoj, kiuj instigas nin pensi pri paco, justeco kaj amikeco kaj do pri belaj ecoj pri kiuj ni devas zorgi, ĉar tiam nia mondo estos bela kaj sekura.

## En nokto de vintra solstico

Vortoj kaj melodio: Luiza CAROL

Cm G7 Cm

la plej lon-ga nok - to del' ja - ro nas - ki - gas so - pi - rojn pri lum' a -  
en nok - to de vin - tra sol - sti - co bur - ĝo - nas la sem' de l'es - per' kaj

6 G7 Cm Gm

ten - das kaj te - ro kaj ma - ro la mil - dan ka - re - son del' sun' ge - fra - toj ĉi nok - te ni  
son - ĝas pri lu - ma fe - li - ĉo la mar' la ĉi - el' kaj la ter'

11 Fm Gm

kan - tu pri pa - co jus - tec' a - mi - kec' la se - mojn de ĝo - jo ni plan - tu por

16 Cm

no - va tut mon - da ju - nec' (Medolio de la kanto aŭdeblas ĉe: <https://kurzelinks.de/solstic-kanto>)





## *En nokto de vintra solstico*

*La plej longa nokto de l' jaro  
naskigas sopirojn pri lum'.  
Atendas kaj tero kaj maro  
la mildan kareson de l' sun'.*

*Gefratoj, ĉi-nokte ni kantu  
pri paco, justec', amikec';  
la semojn de ĝojo ni plantu  
por nova tutmonda junec'.*

*En nokto de vintra solstico.  
burĝonas la sem' de l' esper'  
kaj sonĝas pri luma feliĉo  
la mar', la ĉiel' kaj la ter'.*

*Gefratoj, ĉi-nokte ni kantu  
pri paco, justec', amikec';  
la semojn de ĝojo ni plantu  
por nova tutmonda junec'.*



La melodion de la kanto vi povas aŭdi  
ĉe: <https://kurzelinks.de/solstic-kanto>.

## **Bonvolu respondi:**

1. Kiu skribis la tekston de la kanto?
2. Kiu komponis la muzikon al la teksto?
3. Kial valoras ellerni la vortojn de la kanto?
4. Kio okazas en nokto de vintra solstico?
5. Priskribu desegne la tekston de la kanto laŭ via imagpovo.

Viajn respondojn ĝis la 30-a de decembro 2019 sendu interrete al mi, kaj la desegnojn al la adreso:

Europejskie Centrum Edukacji  
Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A,  
PL-50-007 Wrocław, Polska.

Valorajn premiojn fondis la pola organizajo

Eŭropa Centro de Interkultura  
Edukado [www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl)

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.

## **Unesko uzos Esperanton en festivalo**

**L**a 19-an de septembro 2020 (post unu jaro) Unesko okazigos festivalon por la paco en Tolosa (Hispanio).

La laborlingvoj de tiu ĉi festivalo estas la franca, la angla, la hispana kaj Esperanto. La festivalo konsistas grandparte el filmetoj de kiel eble plej multe da korusoj tra la mondo, kantantaj por la paco en plej diversaj lingvoj, sed la tekstoj de la kantoj devos esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj: franca, angla, hispana aŭ Esperanto.

UEA rigardas la festivalon kiel gravan ŝancon por kontribui en la realigo de la celoj de UN, kaj por vidigi al la publiko la valoron de la internacia lingvo Esperanto. Ju pli da korusoj estos rekomenditaj de

esperantistoj, des pli videblas al la publiko utilo de Esperanto kaj vasteco de la naciecoj de la esperantistoj. UEA alvokas, ke landaj asocioj, lokaj grupoj kaj aktivuloj rekomendu korusojn, esperante, ke ĉiu lando rekomendos almenaŭ unu koruson.

Se vi konas koruson, kiu povus realigi tian 3-minutan filmeton de kanto por la paco, en iu ajn lingvo (kun traduko de la teksto al Esperanto), aŭ rekte en Esperanto, kontaktu François Lo Jacomo, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, kaj Trezoro Huang Yinbao [trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com), vicprezidanto de UEA, respondeca pri la rilatoj kun Unesko.

(GaKo, Gazetaraj Komunikoj de UEA)



Mireille Grosjean

# Festivalo de vinberkultivistoj

**Malofta evento en Vevey, Svislando, kun rimarkinda partopreno de handikapita juna virino.**

**L**a *Fête des Vignerons* – jen la nomo de la evento en la franca lingvo. Ĝi okazas unufoje en ĉiu generacio, do proksimume ĉiujn dudek jarojn, ekde 1797. Ĝi celebras la laboron de tiuj personoj, kiuj kreskigas vinberojn kaj produktas vinon. La listo de nemateriaj mondheredaĵoj de Unesko agnoskas tiun feston. Ĝi okazis en julio-aŭgusto 2019, kun giganta sukceso. En areno kun 20 000 sidlokoj ludis, kantis kaj dancis 6 000 aktoroj, okaze de 20 prezentoj. Surhavante belegajn kostumojn la aktoroj vivas dum du semajnoj, tiel ke oni vidas ilin, ne nur en la areno, sed en la urbo dumtage; el tio naskiĝas en Vevey festa etoso. Vidu [https://fr.wikipedia.org/wiki/Fête\\_des\\_Vignerons](https://fr.wikipedia.org/wiki/Fête_des_Vignerons).

En la spektaklo aperas diversaj laboroj de la vinberkultivistoj, laŭ la sezonoj. Aperas ankaŭ laŭtradicie fama personeco: la lama mesaĝisto. Ekde la jaro 1707 aperas en Svislando almanako kun tiu nomo. Ekde 1676 jam ĝi aperis en suda Germanio. Almanako havas regionan enhavon, prezentas kalendaron kun sanktuloj, publikigas la datojn de la foiroj, kie oni vendas brutojn, enhavas rakontojn, anekdotojn, proverbojn, priveterajn prognozojn, foje karikaturojn kaj ŝercojn. Estas kutimo, ke iu persono kun tia aspekto aperas en la spektaklo de la festivalo. En 2019 okazis skua decido: la lama mesaĝisto ne estu viro, sed virino. La aŭtoroj de la festo trovis Sofia Gonzalez, junulinon dekokjaran, kiu en la aĝo de tri jaroj devis suferi amputon de parto de unu kruro.




Sofia rakontas:  
“En septembro 2018 la aŭtoro de la festo vokis min telefone.

Li volis, ke mi estu la lama mesaĝisto. Estis granda surprizo por mi. Poste mi devis iri al provludoj kaj ricevis kostumon. Fine mi partoprenis la 20 prezentojn, dum kiuj mi estis sur la scenejo dum dek minutoj. Mia vivo estas sporto. Mi ĉiam ŝatis provi ion novan; mi provis naĝadon en naĝejo kaj en la lago, ondorajdadon kun, aŭ sen remilo, rajdadon, dancadon, tenison, skiadon. Mia vivo kiel handikapito estis malfacila en la elementa lernejo, ĉar infanoj ofte mokas sen respekto, kaj ili ne sentas la efikon de siaj diroj. Poste mi povis feliĉe vivi sen primokoj. Nun mi estas en supera mezlernejo kun intensa sporta trejnado, kaj tio estas du horojn tage. Miaj fakoj estas 100-metra kurado kaj longosalto. Mi planas studi en la universitato de Laŭzano (Lausanne) pri komunikado kaj mastrumado-organizado en sporto. Mi povas normale vivi; nur la ŝtuparoj prezentas obstaklon por mi por grimpi laŭ ili; mi kutimas laŭeble uzi lifton. Sportumi altnivele estas mia decido. Mi nun agadas ene de paralimpika sporto, kie la etoso estas tre pozitiva, kaj mi tre ŝatas ĝin. Sporto malfermis al mi diversajn eblojn. Mia handikapo helpis al mi akcepti min, kaj ĝi donas al mi memfidon, kuraĝon kaj fieron. Pro la sporta praktikado mi sentas min en bona ekvilibro kaj korpa kaj intelekta. Ĉiu infano kaj junulo devus sportumi, ĉar tio liberigas la menson post la enlernejaj streĉoj.”

*(Laŭ pertelefona intervjuo.)*



# Kion koro portas, vizaĝo raportas



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**

**Estis ordinara merkreda vespero ĉe la ulidetoj. La tuta familio sidis ĉirkaŭ la granda tablo. Ili diskutis pri la tago dum la vespermanĝo.**

Ĉiuj havis ion por diri, nur Ulideto sidis silente kaj manĝetis sen entuziasmo sian supon. Unue neniu rimarkis lian tristecon. Poste la aliaj pensis, ke li

estas simple tre laca kaj jam duondormetas ĉe la tablo. Sed kiam aperis la unuaj larmoj...

– Ulideto! Kio okazas al vi?

Kial vi tristas? Kial vi ploras?


Kaj jen, la retenitaj larmoj ne plu havis retenilon, Ulideto plorante klarigis al la aliaj, kio okazis tiun tagon en la lernejo.



– Jes! Kaj kiam ni iris eksteren dum la paŭzo, ni vidis la novan knabon el la alia klaso. Li ŝajnas esti tre simpatia, sed tre trista. Ni vidis, ke li estas sola. Ni volis iri babili, ludi kun li, sed kelkaj pli grandaj gelnantoj ne lasis nin iri tien. Ili mokis lin, ridis pri li kaj malhelpis nin iri al li. Ili diris: "Strangulo! Eksterterano! Vi ne estas kiel ni! Reiru tien, de kie vi venis! Vi ne havas lokon ĉe ni!" ktp, ktp, ktp. Kaj ni vidis, ke la nova knabo fariĝas pli kaj pli trista, pli kaj pli soleca. Estas tiom maljuste! Li faris nenion malbonan al la aliaj. Li estas nur nova kaj konas neniun. Mi metis min en lian lokon kaj mi scias, ke li multe suferis hodiaŭ senmerite, kaj ni ne povis helpi lin. Li estis tiom sola, kiel la blua homo en la rakonto de Nathan Chidlow ('naton ŝidlo'). Ĉu vi memoras pri li?

		
<p><b>Nathan Chidlow: La blua homo</b></p>	<p>Estis foje granda ŝtormo kaj unu granda guto falis en la maron.</p>	<p>Sed... en la guto estis homo! Ne ordinara homo, ja li estis blua kaj li spiris en la akvo, ne sur la tero.</p>






Iun tagon la blua homo volis havi amikojn, do li eliris el la akvo. Li tuj renkontis... malbonan homon.  
- Saluton! Ĉu vi fartas bone?  
- Aaaa! Blua monstro! Poliiico! Poliiico!




La blua homo estis trista. Li ne havis amikojn. Li esploris.  
- Ne, mi ne havas amikon. Sed kial mi ne havas amikon? Mi ne plu volas mian akvoguton eliri. Mi volas nur dormi.



Sed dum li dormis... Okazis granda ŝtormo kaj... unu granda guto falis en la maron.  
Hmm... Ĉu ni ne vidis jam similan guton?



Guto + guto en la maro =  
- Saluton! Ho, mi estas blua kaj ankaŭ vi estas blua! Ĉu vi volas esti mia amiko?  
- Jes ja! Tre volonte! Ni estu amikoj! Venu manĝi ĉe mi!



Post iom da tempo:  
- Ĉu vi volas edzigi min? Mi amas vin!  
- Ho, certe! Ankaŭ mi amas vin! Kaj ili amis unu la alian ĝis la vivofino.

- Jes! - diris la aliaj. Ni bone memoras tiun ĉi rakonton. Ĝi havis tre belan finon! Ĉu ne? Do, ne pluru kaj provu helpi morgaŭ tiun novan knabon en la lernejo. Vi faris jam la unuan paŝon.  
- Mi??? Ĝuste ne! Mi faris nenion por li. Mi ne povis, mi...  
- Jes ja, vi faris! Vi jam metis vin en lian lokon kaj tio estas la unua paŝo por helpi lin. La mokantaj infanoj ne atingis ankoraŭ tiun nivelon. Nun vi devas unue helpi ilin ŝanĝi kaj vidi la mondon kaj la novan knabon per... per... per la koro!  
Kiel la eta princo!

Oni vidas bone nur per la koro. Se vi atingas tion - ĉu sola, ĉu kun helpo de la lernejaj plenkreskuloj, vi vidas, ke la nova knabo trovos kaj tute bone havos sian lokon en la lernejo kaj li ne plu estos trista. Kaj nun: ek! Finu la vespermanĝon, lavu viajn dentojn kaj iru en la liton, ĉar ĝi tro solas kaj tristigas sen vi. Morgaŭ estos nova, bela tago. Vi vidas, Ulideto! Bonan nokton!





Renato Corsetti

# Leonardo da Vinci en Britujo\* kaj pri anglalingvanoj kaj grekoj

Okaze de la 500-a datreveno de la morto de Leonardo.

– Referaĵo prezentita al la 86-a Itala Esperanto-Kongreso.

## 1. Enkonduko


Leonardo da Vinci ne estis anglo kaj ankaŭ ne usonano, aŭstraliano aŭ novzelandano. Se li almenaŭ estus kimro aŭ irlandano, oni povus interesiĝi pri li iom pli, sed li restas senespere vera fremdulo. Kaj kiel ĉiuj regantaj kulturoj, la angla kulturo estas memreferenca. Pensu pri la antikvaj grekoj kaj la barbaroj. Se ekzistus lastatempa grandioza hollywooda filmo pri li, tio helpus igi lin parto de la popola kulturo, sed ankaŭ tio ne ekzistas.

Do, se oni diras la simplan nomon Leonardo, kiel kutimas fari italoj, tre verŝajne juna brito pensus plej ofte pri Leonardo Di Caprio, usona fama aktoro, ol pri Leonardo da Vinci. Cetere en Guglo oni trovas por Leonardo Di Caprio 85 milionojn da trovoj kaj por Leonardo da Vinci 146 milionojn da trovoj, sed en la okazo de Da Vinci multe kontribuas levi la nombron la multaj anoncoj okaze de la tre reklamata ekspozicio, organizita de la Brita Biblioteko en la jaro de la 500-a datreveno de la morto de Leonardo.

## 2. La unuaj jarcentoj: kiu plej gravis, ĉu Henriko la 7-a aŭ Henriko la 8-a

Oni devas konfesi la realon. Ĝis la modernaj tempoj Leonardo estis konata en Britujo NUR kiel pentristo. Sed ni devas agnoski, ke ankaŭ en Italujo Leonardo kiel sciencisto ne havis pli grandan sukceson dum almenaŭ du jarcentoj.

Dum la vivo de Leonardo, dum la itala Renesanco, angloj estis okupataj pri sia 'Renesanco'. Ankaŭ ili estis elirantaj el la Meza Epoko, sed en alia maniero. Granda reĝo estis Henriko la 7-a, patro de la pli fama Henriko la 8-a. En la tempoj de Henriko la 7-a la brita regno stabiligis, la nobeloj estis bremsataj kaj finiĝis la mezepokaj bataloj inter nobelaj familioj. La regno iĝis komerce prospera kaj pluraj pac-interkonsentoj estis subskribitaj kun Skotlando, Hispanujo kaj Francujo. Intertempe la protestanta vento blovis tra Eŭropo, la presado alvenis al Britujo kaj oni komencis pensi, ke estas bone, ke ĉiu legu la biblion mem kaj komprenu ĝin sen la klarigo kaj aprobo de pastro.




\*) La aŭtoro preferas ĉe landnomoj la finaĵon -ujo. Vidu: [eo.wikipedia.org/wiki/Landnomoj\\_en\\_Esperanto](http://eo.wikipedia.org/wiki/Landnomoj_en_Esperanto)



Statuo de Leonardo da Vinci en Florenco



Madono kun teksilo



Damo kun ermeno

En ĉi tiu situacio Britujo volis finfine liberiĝi de la enmiksiĝoj de la papo, kies katolika eklezio kolektis impostojn kaj sendis ilin al Romo, nomumis episkopojn ktp. La deziro de la reĝo Henriko la 8-a eksdezigi kaj la rifuzo de la papo doni la permeson iĝis la kaŭzo por la unua briteliro de la brita historio, kiam Britujo eliris el la katolika eklezio kaj inventis sian eklezion, kiun estru la reĝo mem.

La rakontoj pri la ses edzinoj estas belaj popolaj rakontoj kaj ankaŭ veraj, sed ili ne estis la vera kaŭzo de la forigo de la katolika eklezio. La lando komencis esti unuigita kaj potenca, kaj la reĝo volis mem regi ankaŭ la eklezion, sen la influo de la papo. Laŭ mi li ne estis bona reĝo kiel la patro, sed tion ne diru al la angloj.

La luktoj inter katolikoj kaj protestantoj tamen daŭris dum la tuta jarcento. Kaj fine de la jarcento intertempe komenciĝis la esplorvojaĝoj ekster Eŭropon kaj naskiĝis la unuaj partoj de la brita imperio.

Tio klarigas, kial oni ne tre atentis pri Leonardo, sed oni ja atentis pri la itala renesanco kaj pri la itala literaturo, kiu estis


sekvata de multaj tiutempaj intelektaj britoj. Ne hazarde Ŝekspiro metas la eventojn de siaj teatraĵoj al Italujo, la plej progresinta eŭropa lando en tiu momento.

### 3. La unuaj kontaktoj inter la angla mondo kaj Leonardo

Ni diris, ke Leonardo estis ĉefe konata kiel pentristo en Italujo kaj ankaŭ en la tuta Eŭropo, inkluzive de Anglujo. La fama *Sinjorino Liza* (aŭ *La Gioconda* laŭ la nomo uzata en Italujo) ankoraŭ ne estis finpentrita kaj ĝi jam estis imitata tra la tuta Eŭropo.


Tre frue, jam en 1625, la brita reĝo Karlo la 1-a, kiu estis granda art-amanto, certe sciis pri ĝi. Fakte en tiu jaro li petis la francan kortegon pri franca princino kiel edzino, Henriette Marie, kaj ĉe la okazo petis prunton de tiu petraĵo de Leonardo, kun reĝa promeso redoni ĝin.




Oni donis al li la princinon, sed ne la pentraĵon. Cetere Karlo la 1-a estis katolika reĝo, en momento en kiu oni provis rekatolikigi la landon, sed en la fino li estis



Leonardo da Vinci

Codex Leicester





mortigita de protestantaj ribelantoj. Temis pri la angla revolucio, unu jarcenton antaŭ la franca. Ankaŭ en la angla revolucio oni mortigis la reĝon kaj asertis la aŭtoriraton de la Parlamento, kvankam post kelkaj jardekoj la reĝa sistemo estis restarigita. Ne multo estis komuna kun la franca revolucio, ĉar en Britujo la afero estis nur plia ĉapitro de la lukto inter protestantoj kaj katolikoj.

La reĝino Henriette Marie donis la nomon al la usona lando-parto Maryland, kien enmigris iom da britaj katolikoj.

Sed, por reveni al Leonardo kiel sciencisto, lia bonŝanco kaj en Italujo kaj eksterlande estis la forrabo de liaj verkoj, manskribitaj la 25-an de novembro 1796 de la Biblioteca Ambrosiana en Milano, fare de la franca armeo, kiu portis ilin al Parizo, kie la itala fizikisto Giovanni Battista Venturi analizis ilin kaj verkis sian eseon: *Essai sur les ouvrages physico-mathématiques de Leonard de Vinci (Eseo pri la verkoj fizik-matematikaj de Leonardo da Vinci)*, cetere sen la studoj pri flugado, kiujn li taksis senbaza revo. Tiam tra la tuta Eŭropo oni komencis malkovri la sciencajn studojn de Leonardo. Fakte je lia morto liaj manskribitaj libroj disperdiĝis inter publikaj kaj privataj bibliotekoj. Bonŝance multaj estis en tiu milana


biblioteko. Anglaj kolektistoj trovis kaj aĉetis liajn skribaĵojn en Francujo, ekzemple la grafo de Arundel en 1667 aĉetis en Francujo la libron nun konatan kiel *Codex Arundel*, kaj en 1700 alia kolektisto, la grafo de Leicester, aĉetis la libron *Codex Leicester*, kiu de vendo al vendo nun estas posedata de Bill Gates.

#### 4. La festado en Britujo pri la 500-a datreveno de la morto de Leonardo: la vera momento de la malkovro de Leonardo

Sur tiuj du libroj kaj sur la *Codex Forster II* [akirita en 1873 de la kolektisto John Forster] estis farita tre brila ekspozicio *Leonardo da Vinci: A Mind in Motion* (Leonardo da Vinci: menso moviĝanta) ĉe la Brita Biblioteko ĉi-jare kun kopioj de paĝoj de la libroj, tradukoj kaj klarigoj pri la maniero scivole rigardi al la mondo de Leonardo.

La ekspozicio estis vere brila kaj intense reklamata la tutan jaron, tiel, ke ĝi atingis la tutan anglalingvan mondon kaj recenzojn pri ĝi oni trovas ankaŭ en usonaj aŭ aŭstraliaj gazetoj.


Do, ne estis hollywooda filmo, sed almenaŭ io anglalingva, pri kiu la anglalingva mondo povis interesiĝi.





Luiza Carol

# Svisa poemrakonto



**Sonoril-Urĉjo** de Selina Chönz  
kun ilustraĵoj de Alois Carigiet.  
Esperantigis verse Dietrich Michael  
Weidmann. 2017. Allsprachendienst  
Esperanto. 45 paĝoj.

**S**onoril-Urĉjo estas porinfana libro, konsistanta el versa kaj bele ilustrita prezentado de la regiono Engadino, kiu troviĝas en la svisa kantono Grizono. La originala versio de la libro aperis en 1945, en dialekto kiu nomiĝas “putera”, apartenanta al la belsona svisa lingvo nomata “romanĉa”. Pere de tiu ĉi versa libro ni povas malkovri diversajn informojn rilate la tradician vivon de la homoj, loĝintaj en tiu parto de la mondo: kiel aspektis iliaj domoj kaj iliaj vestaĵoj, pri kio ili okupiĝis, kiel aspektis la ĉirkaŭanta naturo ktp. Niatempe aperis modernaj konstruaĵoj apud la malnovaj, sed la tradiciaj belaj formoj de la pordoj kaj tegmentoj ne malaperis kaj eĉ ili estas nun bele prilaborataj de modernaj arkitektoj. Tio validas ankaŭ pri la vestaĵoj kaj pri diversaj aspektoj de la nova vivo: la nuna generacio respektas, konservas kaj evoluigas la belajn malnovajn tradiciojn. Tio validas ankaŭ koncerne la lingvon kaj la literaturajn trezorojn verkitajn en la tradicia lingvo de Engadino, kiujn la homoj konservas kaj eĉ tradukas en multajn lingvojn, por ke ili estu konataj kaj prezataj tra la tuta mondo.

La protagonisto de tiu poemlibreto estas la knabo Urĉjo, pri kies vivkondiĉoj ni ekscias kaj per la ilustraĵoj kaj per la versoj. Jen signifa fragmento, el kiu oni ekkonas ne nur kiel aspektis la vestaĵoj de la viroj en Engadino, sed ankaŭ pri kio okupiĝis grandparte de la tempo la virinoj kaj la viroj en la malnova vilaĝo de Urĉjo:

*“Jen Urĉjo, lin rigardu kun admiro,  
montara knabo, kvazaŭ eta viro!  
Kiel montopinto sur la kapo  
rekte staras pinta ĉapo;  
trikitas ĝi el ŝafa lano  
ŝpinita de l’ patrino mano.*

*La patrino ŝpinas, trikas, teksas vestojn  
ja por tio oni bredas en la urĉja stalo bestojn.*

*La patro kun najloj por la filo ledajn ŝuojn  
faras kaj jen en ĉi tiuj vestaĵoj nia Urĉjo staras.”*

La versa rakonto fokusiĝas al Ĉalanda Marco, bela tradicia festo de Engadino, okazanta ĉiujare je la unua de marto. Tiam la infanoj sonorigas sonorilojn por forpeli la vintron kaj bonvenigi la printempon. Tiuokaze la vilaĝanoj donacas dolĉaĵojn al la infanoj kaj ĉiuj ĝojas. Ĉar la festo okazas ankaŭ niatempe, vi povas vidi filmetojn pri ĝi pere de la komputilo. Unu bela ekzemplo: [www.youtube.com/watch?v=HfJ\\_TX-uJZk](http://www.youtube.com/watch?v=HfJ_TX-uJZk)

En la rakonto, kiam okazis la disdono de sonoriloj, eta Urĉjo estis puŝita de pli grandaj buboj, tiel ke li alvenis la lasta en la vico, ricevis la plej malgrandan sonorilon kaj oni primoke nomis lin “Sonorilaĉa-Urĉjo”. Tio ege ofendis lin kaj igis lin elpensi rimedon por havigi al si la grandan belegan sonorilon, kiu troviĝis alte en la montaro en la kroma domo de la familio (la malproksima tiel-nomata “printempa domo”).

Kiam vi legos la poem-rakonton, vi ekscios pri la timigaj aventuroj, kiujn la eta Urĉjo trapasis brave, ĝis li akiris tiun sonorilon, kies amoplena priskribo aperas en la jenaj versoj:

*Plej belas kaj pezegas ĝi kaj impresas ĝia sono,  
la zono brodaĵon montras sur florplena fono.*

*La buko lumas per brilego ora,  
kaj ĝia sono estas pura kaj sonora!*

La gepatroj de Urĉjo kune kun vilaĝanoj serĉis la knabon dum la tuta nokto. Frumatene li revenis hejmen kun la belega sonorilo kaj fiere partoprenis la feston, dum ĉiuj admiris lian sonorilon kaj precipe lian kuraĝon. La rakonto finiĝas per la priskribo de la feliĉa vespermanĝo en la domo de Urĉjo, kie lia patrino servas “marondeserton kun freŝa kremo”.

# Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,  
ul. Kilińskiego 14/3,  
PL-59-300 Lubin,  
Pollando, rete:  
*malgosia.*  
*junaamiko@gmail.com*



## Nobel-premio pri Literaturo

**Ĉi-jare Sveda Akademio decidis aljuĝi duoblan Nobel-Premion, ĉar pasintjare pro skandalo oni ne aljuĝis ĝin.**

**T**iel do en la jaro 2019 estas du premiitoj. Peter Handke, aŭstra verkisto, kaj Olga Tokarczuk, pola verkistino. Ŝia nomo jam estis menciita multfoje por la Nobel-Premio pri literaturo. Peter Handke estas ricevanto de Nobel-Premio de la jaro 2019 kaj Olga Tokarczuk estas ricevintino de Nobel-Premio de la jaro 2018 en la jaro 2019. En Pollando nun oni ne povas aĉeti ŝiajn librojn, malgraŭ tio, ke oni faras novan presadon...

Poloj volonte substrekas, ke ĝenerale legado de libroj pozitive ŝanĝas ilian vivon. Ili pli ofte ridetas, fariĝas tiuj, kiuj deziras kaj danke al la legado ili efektivigas ĝustajn elektojn privatajn kaj fakajn.

Imagu, ke pasintjare 60% de poloj ne tralegis eĉ unu libron (!), sed nun la situacio ŝanĝiĝas, kaj multaj serĉas librojn de nia nobelpremiulino.

La Nobel-Premio estis iniciatita laŭ la testamento de Alfred Nobel,

la inventinto de la dinamito. Tiu grava premio estas aljuĝata ĉiujare al la homoj, kiuj faris eksterordinaran sciencan malkovron, aŭ eksterordinare kontribuis al la socio, ekzemple kulture.

La unua solena ceremonio por enmanigi la premion okazis en 1901, en la Reĝa Akademio de Muziko en Stokholmo (Svedio). De 1902 la premiojn disdonas la sveda reĝo, krom la pacpremio, kiun donas la norvega reĝo en Oslo. La premioj estas aljuĝataj de svedaj kaj norvegaj komitatoj je sekvaj kampoj: fiziko, kemio, literaturo, fiziologio aŭ medicino, ekonomio kaj paco.

La Nobel-Premio ne estas atribuita postmorte, kaj tio signifas, ke se la persono, al kiu estas atribuita premio, mortos antaŭ ol ricevi ĝin, la premio jam ne validas.

Ludoviko Zamenhof estis okfoje kandidatigita por la Nobel-Premio pri paco, de 1907 ĝis 1917.

## Klubo de bona libro

**L**a Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli



fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo sendu al la apudpaĝa adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Legu, legu, legu!

## Rekomendo


Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas fabelon *La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson*, kiun skribis Selma Lagerlöf – kaj kial mi elektis ĝin, legu sube...

*La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson* (origine svede *Nils Holgerssons underbara resa genom Sverige*) estis publikigita en du partoj en 1906 kaj 1907. El la sveda tradukis ĝin Esperanten Sten Johansson, kaj la Esperantan version eldonis Fonto, Chapecó, en la jaro 2002 en Brazilo.

La libron skribis Selma Lagerlöf, antaŭ jarcento, danke al mendo de Nacia Asocio de Instruistoj, por krei legolibron pri patrolando por lernejoj. La aŭtorino dediĉis tri jarojn por studi naturon kaj familiarigon kun la vivo de bestoj kaj birdoj, sed ankaŭ folkloron kaj legendojn de diversaj svedaj provincoj. Danke al la mirinda talento de Selma

Lagerlöf tiu libro fariĝis ŝatata ne nur en Svedio, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj.

Legante la verkon *La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson*




ni ekscias multon pri la geografio kaj historio de Svedio, sed antaŭ ĉio ni amuziĝas kaj fasciniĝas per la multaj aventuroj kaj fabeloj, kiujn la aŭtorino kunplektis en mirindan tekston.

La heroo de la libro estas knabo Nils Holgersson. Li ŝatas manĝi kaj dormi kaj ĝeni la bestojn de la familia farmo. Iun tagon li estis sorĉita de koboldo en “fingruleton” kaj al kroĉita forte al la kolo de la birdo komencas sian vojaĝon tra historiaj provincoj de Svedio.

Dumvojaĝe li spertas aventurojn kaj aŭskultas fabelojn, kiuj rakontas pri diversaj lokoj, bestoj kaj personoj en Svedio. Samtempe li devas pruvi sian flugokapablon kaj demonstri al la anseroj, ke li estas utila kompanio.

Nils pliboniĝas, kaj do evoluas de malica egoisto, kruela kontraŭ bestoj, en personon maturan kaj respondecan. Nur tiam la koboldo estas preta redoni al la knabo lian originan grandon.

Mi elektis ĉi tiun fabelon ankaŭ pro la aŭtorino. Selma Lagerlöf estas la unua virino, kiu gajnis la Nobel-Premion pri literaturo. Ŝi ricevis ĝin en la jaro 1909 kaj en la jaro 1914 ŝi fariĝis ano de la komitato, kiu aljuĝas la Nobel-Premion pri literaturo.





# Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo



Konkurso ne nur por junaj legantoj. Rubrikestro: Małgosia Komarnicka

**Ĉi-numere mi proponas viziti Israelon. Ĝi estas lando de Luiza Carol, kiu helpis al mi prepari la rubrikon.**

**L**uiza Carol estas esperantistino, poetino, multjara kunlaborantino de nia revuo *Juna Amiko*, multjara ano de la redakcio de la revuo por vegetaranoj *Esperantista Vegetarano*.

Prenu mapon, trovu Israelon kaj per kelkaj informoj trovitaj en interreto, konatiĝu kun ĝi. Poste tralegu la rubrikon kaj klopodu trovi sur la mapo la menciitajn lokojn, kaj fine faru konkursajn taskojn.

## Kio allogas min en Israelon?

Israelo (hebree מדינת ישראל, Medinat Jisra'el, Ŝtato de Israelo) estas lando en Sud-Okcidenta Azio. En Jerusalemo troviĝas la plej sanktaj lokoj de Judismo kaj Kristanismo, kaj la tria plej sankta loko por Islamo. En Hajfo troviĝas la plej sankta loko por la Bahaa Kredo. La tombejo de

Jetro apud Tiberio estas la plej sankta loko por la Druza religio. Israelo estas ankaŭ la naskiĝejo de Judismo. Israelo enhavas sanktejojn de la kvin religioj: juda, kristana, islama, druza kaj bahaa. Tial la plej famaj kaj plej gravaj legendoj de tiu lando estas kunligitaj ankaŭ kun religiaj tradicioj.

Israelo estas dividita en ses distriktojn, sudan, centran, nordan, Jerusalemon, Tel-Avivon kaj Hajfon. Tiuj tri menciitaj urboj estas la plej grandaj urboj de Israelo.

La ĉefurbo de Israelo estas Jerusalemo. El geografia vidpunkto ĝi estas verŝajne la plej "legendoplena" loko en la mondo. Tamen la financa kaj teknologia ĉefurbo estas Tel-Avivo. La moderna ŝtato de Israelo identigas siajn radikojn kun la malnova Tero de Israelo (Erec Jisrael), centra koncepto de la Judismo de tri mil jaroj.

Priskribante Israelon oni nepre devas akcenti ĝian buntecon kaj do buntecon de etnoj, de religioj, de lingvoj, de muzikaj kaj kuirartaj tradicioj... Ĉiu socia ero samtempe konservas sian unikecon kaj malfermiĝas al influoj. Rezultas interesaj miksaĵoj de gustoj kaj kutimoj, dum la



Jerusalemo



Tel-Avivo





individuaĵaj trajtoj konserviĝas kaj eĉ plifortiĝas pere de kontrastoj.

La kulturo de Israelo estas nedisigebla de la historio de la judismo kaj de la juda popolo. La kultura diverseco de Israelo derivas de la diverseco de ĝia loĝantaro: judoj de ĉie alportis siajn kulturajn kaj religiajn tradiciojn kun si, kreante fandujon de kutimoj kaj kredoj de la juda kulturo. Israelo estas la sola lando de la mondo, kie la vivo ĝiras ĉirkaŭ la hebrea kalendaro. La laboro kaj la lernejaj ferioj estas determinitaj de la judaj festoj, kaj la oficiala tago de ripozo estas sabato (en la hebrea: שבת *šabato*).

La israela kuirarto (en la hebrea המטבח הישראלי *ha-mitbaħ ha-israeli*) konsistas el lokaj pladoj de la indiĝenaj homoj de Israelo kaj pladoj alportitaj al Israelo de la judoj de la diasporo. La israela juda fuziiga (flagrigo) kuirarto evoluis en 1948, antaŭ la kreo de la ŝtato Israelo, kaj precipe en la fino de la 1970-aj jaroj. Vegetarismo kaj veganismo ekfloras en Israelo (fine de la rubriko vi trovos la repton de Luiza por prepari bongustan kikerpaston).

Israelo troviĝas en vojkruĉiĝo de klimataj influoj, kiuj permesas distingi ĝis kvardek malsamajn tipojn de klimato en tiel reduktita surfaco. La montaj regionoj kutimas esti ventaj kaj tre malvarmaj, kelkfoje kun neĝadoj. Jerusalemo ĝenerale ricevas almenaŭ unu neĝadon ĉiujare.

Israelo eksportas poluritajn diamantojn, maŝinindustriajn produktaĵojn, kemiaĵojn, fruktojn, legomojn, elektronikajojn



kaj teknikaĵojn, kaj importas polurotajn diamantojn, manĝaĵojn, karburaĵojn kaj aliajn, ĉefe el Usono, Belgio kaj Germanio.

Vizitante Israelon nepre indas viziti Jerusalemon kaj en ĝi la Muron de lamentadoj, la Templon de Dia Tombo, la Kupolon de la Roko, la Krucan Monaĥejon kaj la vojon Via Dolorosa. En Nazareto indas viziti la Preĝejon de la Anoncado. Kapernaŭm, kies nomo signifas “Vilaĝo Nahum” (hebree: Kfar Nahum), estas antikva vilaĝo, kiu entenas multajn arkeologiajn vidindaĵojn. Relative proksime de la Morta Maro troviĝas la Masada-fortikaĵo (hebree: *Mecada*). La Morta Maro fakte ne estas tute morta kaj en la hebrea nomiĝas “Sala Maro”. Ĝi estas unike bela.

Luiza Carol rekomendas tre belan kaj gravan lokon, Pacoazon. Tie antaŭ kelkaj jaroj oni organizis Esperantan kunvenon. Pacoazo estis fondita por eduki kune dulingve judajn, kristanajn kaj islamajn infanojn. Tiu loko helpas kompreni malfacilaĵojn de Israelo kaj ĝian strebado por paco fare de optimismaj homoj.


## Pacoazo

*Neve Shalom* en la hebrea, *Wahat Al-Salam* en la araba, *Pacoazo* en Esperanto – jen la nomo de tiu vilaĝo, esprimita en tri lingvoj.




Morta Maro





La fondinto de la vilaĝo estis la ekumena pastro Bruno Hussar. Ekde la komenco de la 1970-aj jaroj judaj kaj arabaj civitanoj de Israelo konstruas siajn domojn tie kaj kunvivas fratece. La vilaĝo havas nun 60 familiojn, kiuj apartenas al la juda, kristana kaj islama kredoj. La homoj, kiuj decidis loĝi tie, kunedukas siajn infanojn en dulingvaj infanĝardeno kaj elementa lernejo. La infanoj lernas kune en la hebrea kaj la araba. Tamen, pli grava ol la lingva eksperimento, estas la socia eksperimento. La infanoj estas edukataj de la samaj infanĝardenistoj kaj instruistoj, per la samaj fabeloj kaj kantoj, ili legas la samajn librojn kaj lernas el la samaj manlibroj pri historio. La lecionoj pri religio ne okazas laŭ standarda maniero (t.e. ili ne okazas po 2 aŭ 3 horojn ĉiusemajne, pri unu sola religio). Okaze de ĉiu juda, kristana kaj islama festo, ĉiuj infanoj lernas pri la koncerna tradicio, ties profunda senco, ties signifo en nia moderna vivo. Tial



la infanoj de Pacoazo ĝuas trioble pli multajn feriojn ol aliaj infanoj, sed dum la ferioj ili multe lernas kaj maturiĝas. La instruistoj aparte kuraĝigas la infanojn viziti unu la aliajn dum la religiaj festoj, interŝanĝi bongustajn tradiciajn manĝaĵojn, interesajn familiajn rakontojn ktp. La granda sukceso de tia edukado evidentiĝas pri tio, ke lastatempe multaj familioj el apudaj vilaĝoj sendas la infanojn al la fama lernejo de Pacoazo.

En Pacoazo troviĝas blanka domo, melonforma, kiu nomiĝas Domo de Silento. Ĝi estas domo, konstruita por ke iu ajn povu veni tien kaj mediti pri la profundaj komunaj sencoj de ajna religio.



Inter la 22-a kaj 24-a de oktobro 2009 okazis en Pacoazo la 10-a KIES (Komuna Israela Esperantista Semajnofino). La temo de la prelegoj estis "Paco kaj konekzisto". Alvenis tien 59 partoprenantoj el 5 landoj.



**Luiza en la blanka melonforma "Domo de Silento" antaŭ meditado.**



## Recepto de Humuso (Kikerpastro)

2 ladskatoloj da boligigitaj kikerroj (2x450g),  
oni uzu la kikerojn de du ladskatoloj, sed la  
likvon de nur 1 lad-skatolo

1/4 taso da sezamaj semoj

1 kulero da olivoleo

1/4 taso da citronosuko

1 ajla ero

iom da salo

Miksu ĉion per rapida miksililo.

Mangŭ kun pano aŭ freŝaj legomoj.



malgranda kaj malsperta ulo kuraĝas lukti  
kun li. Davido rapide uzis sian simplan  
ŝton-ĵetilon kaj trafis la okulon de la  
giganto. Tiu sentis grandan doloron, perdis  
sian ekvilibron kaj Davido sukcesis mortigi  
lin. La tuta granda malamika armeo  
retiriĝis post tiu evento kaj longtempe ne  
plu kuraĝis reveni. La knabo Davido gajnis  
la respekton kaj la dankon de la reĝo Ŝaulo,  
kiu invitis lin al sia palaco. Iom post iom  
la literatura kaj muzika talentoj de Davido  
igis lin fama en la tuta lando.

Kiam Davido estis tre juna kaj ankoraŭ  
ne fariĝis la reĝo de la lando, malamikoj  
persekutis lin en la montaro, proksime  
de Jerusalemo. La onta reĝo estis sola kaj  
havis neniun armilon. Li eniris iun groton  
por kaŝi sin. Ĉe la eniro de la groto eta  
araneo tuj komencis teksu retan. Ĝi laboris  
diligente kaj rapide. Ĝis la malamikoj  
alvenis al la groto, la enirejo estis tute  
kovrita per la aranea reto. “En tiu ĉi groto  
ne indas serĉi lin” – diris la malamikoj. –  
“Se li estus kaŝiĝinta ĝuste tie ĉi, la aranea  
reto estintus rompita.” Ili ne povis imagi,  
ke okazis miraklo, kaj la araneo kovris la  
enirejon dum nur kelkaj minutoj, por savi  
la vivon de la estonta fama reĝo, poeto kaj  
muzikisto.

Onidire la reĝo Davido neniam forpasis.  
Li troviĝas ankaŭ nun en iu sekreta groto  
apud Jerusalemo, kie li dormas, ĉirkaŭata

## Legendoj

Luiza Carol proponas tralegi mallongajn  
judajn folklorajn eldirojn pri la reĝoj  
Davido kaj Solomono. Tiuj reĝoj estas  
historiaj protagonistoj kaj ili aperas  
en la Biblio kaj en la Korano kaj ankaŭ en  
la sanktaj tekstoj de Baha'u'llah. Ekzistas  
dekoj da legendoj pri tiuj reĝoj, sed Luiza  
elektis tiujn, kiuj ŝajnis al ŝi la plej belaj.

### Judaj folkloraj eldiroj pri la reĝoj Davido kaj Solomono

La reĝo Davido estis fama poeto kaj  
muzikisto. Onidire, kiam li estis knabo, la  
estonta reĝo estis humila paŝtisto kun bela  
voĉo. Sed li estis tiom aŭdaca kaj sprita,  
ke li kuraĝis alfronti la giganton Goliato,  
kiu estis la ĉefo de forta malamika armeo.  
Komence la giganto malrespektis la  
knabon kaj ekridis, kiam li aŭdis, ke tiom



de plej grandvaloraj juveloj. Li dormas sur veluraj kusenoj kaj apud li estas ora ujo, kiu enhavas “la akvon de la vivo”. Po unu fojon en kelkcento da jaroj, dum nokto kun plena luno, la reĝo Davido vekiga. Malrapide li etendas sian manon al la ujo, por trinki el la mirakla akvo. Sed pro maljuneco li estas tre malforta, lia mano tremas kaj li ne sukcesas trinki. Post nur kelkaj sekundoj li ekdormas denove, kaj denove pasos kelkcentoj da jaroj, ĝis li malfermetos siajn okulojn. Se foje troviĝas apud li iu junulo, kiu rapide portus la ujon al la buŝo de la reĝo..., tiu reviviĝas kaj revenus al sia popolo, por ke la paco kaj la bona vivo regnu en la tuta lando kaj eĉ en la tuta mondo. Sed por ke okazu tia miraklo, nepras, ke tiu junulo estu perfekte honesta kaj bonkora, deziranta nenian avantaĝon por si mem, celanta nur la bonon de sia popolo kaj de ĉiuj aliaj popoloj. Sen tiaj noblaj virtoj neniu kapablas trovi la enirejon de la groto.

Onidire antaŭ longe la anĝelo, kiu gardas la sekretan groton, trovis iun junulon, kiu meritis provi plenumi tian grandiozan taskon. Tiu anĝelo vizitis la junulon en sonĝo kaj diris al li, ke en la okazo de fiasko li ne plu povos eliri el la groto. Sed la junulo konsentis riski sian vivon por revivigi la reĝon Davido, kiu alportus pacon kaj kontenton en la mondon. La anĝelo gvidis liajn paŝojn ĝis la sekreta groto kaj enigis lin tien, ĝuste

antaŭ la momento kiam la reĝo devis vekigi. La groto estis plen-plena de juveloj kaj grandvaloraj trezoroj, al kiuj la junulo eĉ ne rigardis. Sed super la seĝo de la dormanta reĝo brilis granda diamanto, kiu fascinis la junulon. Liaj okuloj fiksiĝis al ĝi... – kaj li perdis la momenton, kiam la reĝo vekiga. Do li fiaskis, ĉar dum kelkaj sekundoj fascinis lin materia valorajo. Kaj neniu scias, kiam okazos denove simila ŝanco por la homaro...

La reĝo Solomono estis konsiderata la plej saĝa homo de sia tempo.

Onidire foje du virinoj venis kun bebo al Solomono kaj petis justecon. Ĉiu el la du virinoj diris, ke la bebo estas ŝia, kaj ili atendis, ke la reĝo decidu, kiu estas la vera patrino. Tiam Solomono ordonis, ke oni haku la bebon kaj donu po unu duonon de la bebo al ĉiu virino. Unu virino ĝojis pri tiu decido. La alia freneze kriis, surgenuiga kaj petegis la vivon de la infano, eĉ se oni donos ĝin al la alia virino. Solomono diris: “Tiu, kiu protektas la vivon de la bebo, estas la vera patrino. Al ŝi oni donu la bebon.”

Onidire foje la reĝo Solomono sonĝis pri sia patro, la forpasinta reĝo Davido. Tiu ĉi rakontis al li pri la ĉiela Jerusalemo, kiu similis la teran Jerusalemon, sed enhavis belegan templon meze de ĝi. La reĝo Davido priskribis tiun templon laŭ ĉiuj detaloj, por ke lia filo konstruigu iun similan sur la tero. Sed li aldonis, ke oni ne devas uzi feron por la konstruado, ĉar feron oni uzas por armiloj, kaj tial ĝi ne taŭgas por la sankta templo, kie la homoj preĝos por paco.


Kiam Solomono vekiga, li volis plenumi ĉiujn konsilojn de sia patro. Sed kiel tranĉi ŝtonon por la templo, sen uzi feron?

Maljuna konsilisto de la reĝo sciigis lin pri iu vermo, kapabla tranĉi ŝtonon. Sed tiu vermo troviĝis ĉe la malica demono Aŝmedaj.

Solomono estis tiom forta kaj riĉa danke al tio, ke li portis sur sia fingro magian ringon, kun la sekreta nomo de Dio,



Davido kaj Solomono



gravurita ene de ĝi. Solomono ricevis tiun ringon de sia patro kaj uzis ĝin kelkfoje por alvoki demonojn kaj ordoni al ili diversajn aferojn.

Ĉi-foje li alvokis la demonon Aŝmedaj kaj petis de li la vermon, kiu tranĉas ŝtonon. Sep jarojn daŭris la konstruado de la Granda Templo de Solomono en Jerusalemo, kaj dum tiu tempo la reĝo tenis la demonon enkatena en la palaco, por ke li ne malhelpu la konstruadon. Sed post kiam la konstruado finiĝis, ĝi estis tiom bela ke la reĝo fieris pri ĝi tro multe, kaj li fariĝis tro vanta. Solomono ne plu toleris la fakton, ke Aŝmedaj estis tiom potenca.

La reĝo volis ekkoni ĉiujn sekretojn de Aŝmedaj, kiel kondiĉon por liberigi lin. Sed Aŝmedaj estis tre ruza kaj manipulis la vantecon de la reĝo.

La demono petis havi la magian ringon dum nur kelkaj sekundoj, por klarigi al la reĝo iun sekreton. La reĝo fariĝis tiom memfida, ke li supozis, ke eĉ sen sia ringo li estus pli forta ol la demono. Kaj evidentiĝis, ke tio estis granda eraro. Aŝmedaj forĵetis la ringon, kiu flugis super Jerusalemo kaj super montoj kaj valoj, ĝis ĝi atingis la maron kaj falis profunden en ĝin. Poste Aŝmedaj forĵetis la reĝon ege malproksimen, en dezerton de fora lando...

Dum dekoj da jaroj Solomono vagadis tra fremdaj landoj. En la komenco li estis almozulo; poste oni sklavigis lin; poste li eskapis kaj faris diversajn humilajn laborojn...

Foje li kaptis fiŝon, en kies ventro li trovis la magian ringon. Li metis ĝin sur la manon kaj subite revenis en sian palacon. La jardekoj de vagado vaporigis. Solomono estis denove juna kaj potenca reĝo, kiu ĵus konstruis la belegan templon en Jerusalemo. Sed nun lia saĝeco multe kreskis, ĉar li ne plu estis vanta kaj aroganta. Li lernis respekti la humilajn homojn, lernis kion signifas malriĉeco, sufero, maljusteco...

**Rimarko:** Ĝis nun neniu sciencisto povis klarigi, kiamaniere la tiutempaj judoj kapablis tranĉi tiom fortajn ŝtonojn per siaj tre simplaj iloj. La afero estas unu el la misteroj de la historio.

La **konkursata** tasko estas jena: Redaktu 20 demandojn pri la tuta teksto de *Ekkonumian landon pere de ĝia legendo*.

Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) bildforme prezentos la mallongajn folklorajn eldirojn.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko "Konkurso – legendo" ĝis la 30-a de decembro 2019 al la adreso: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL-50-007 Wrocław, Pollando.

La valorajn premiojn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.



Solomono (pentraĵo de Pedro Berruguete)





Pontoj

Mireille Grosjean

# Nepalo, montara lando, bezonas pontojn




**Laŭ svisa ambasadoro Thomas Gass (li prelegis en La Chaux-de-Fonds en novembro 2018) 12 000 pontoj estas bezonataj kaj 6000 oni jam konstruis.**

**L**ia temo estis la evoluo de la helpaj programoj de Svislando al evolulandoj. Oni devas koni la regionon kaj koni ĉiujn riskojn ĉu sociajn, ĉu ekologiajn, ĉu politikajn, antaŭ ol komenci adekvate kontribui al progreso por iu popolo.

Tiuj pontoj en la montoriĉa Nepalo ebligas al la homoj el foraj vilaĝoj atingi kuraĉlokojn, iri al pli granda vilaĝo por voĉdoni, kaj al infanoj atingi lernejojn. Multaj infanoj nun ne povas iri al lernejo, aŭ provas iri kaj uzas kablojn por trairi valojn, kaj oftas la akcidentoj. La celo de Svislando en Nepalo, kaj de aliaj

kontribuantaj landoj kompreneble, estas ne lasi parton de la popolo sur la rando de la strato: ni devas pensi pri ĉiuj popolanoj, eĉ pri la plej malriĉaj. Plia problemo estas, ke tiuj subaj sociaj tavoloj foje estas malrespektitaj pro la kasto-sistemo, kiu daŭras en la menso de la homoj. Alia problemo estas, ke multaj homoj ne estas ie registritaj, do ne havas leĝan identecon. Mankas al tiuj personoj la ebloj akiri stirpermeson, voĉdoni, heredi, malfermi butikon aŭ entreprenon. Konsekvence la registaro ne serĉas tiajn infanojn por instrui al ili la bazajn konojn, konsekvence ili ne povas peti respekton de siaj rajtoj, kaj ofte ili eĉ ne konas siajn rajtojn. La rajtojn oni ekscias, legante informojn pri ili, kaj legi oni lernas en la lernejo... La daŭripova evoluo venos nur, se la tuta popolo povas atingi instruadon, en ĉiuj mondopartoj. Tio estas la konvinko de Unuiĝintaj Nacioj.





Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
Esperanto-klubo “Betuleto”  
Lernejo/Ŝkola 56,  
pr. Traktorostroitelej, 38  
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio  
*lena\_espéro@mail.ru*



## Kulturdomo de Esperanto en Kastelo

### Saluton, karaj legantoj!

**Interkultura mondo ŝatas denove prezenti al vi neordinarajn eventojn, kie homoj povas sperti diversecon de nia Terglobo.**





**Ĉ**i-numere ni gvidos vin al unu el la plej interkulturaj lokoj de la mondo. Temas pri la fama kastelo Greziljono en Francio. En ĝi okazas multaj interesaj kaj vere interkulturaj eventoj. Interalie, la Kulturdomo organizas Esperanto-programojn en somero kaj dum aliaj francaj lernejoj ferioj. Ili daŭras unu aŭ plurajn semajnojn.

La kastelo situas 250 km sudokcidente de Parizo, en la urbeto Baugé-en-Anjou, inter la urboj Anĝevo, Le Mans kaj Tours, en okcidenta Francio.

La konstruaĵo kalkulas sian historion ekde la 16-a jarcento! Ekde 1951 ĝi iĝis “Kulturdomo de Francaj Esperantistoj”. Post membrokunveno kaj statutŝanĝo en 2012 la delonge uzata nomo “Kulturdomo de Esperanto” iĝis oficiala.

La plena nomo sonas kiel “Kulturdomo de Esperanto Kastelo Greziljono”. Kaj tio estas tute merita. Jam de multaj jaroj en la kastelo okazas diversaj eventoj, ligitaj kun kulturoj kaj interkulturo. Jen estas listo de nur regulaj Esperanto-renkontiĝoj:

- PRINTEMPaS, fine de aprilo (ekde 2010), intensivaj kursoj kun KER-ekzameno;
  - Alternativa semajno, en julio (2011-2014), pri ĉiuj alternativaj temoj, kun kursoj;
  - Festa semajno por infanoj, junuloj kaj familioj, en aŭgusto (ekde 2011), kun kursoj;
  - Turisma semajno en somero (2011-2013, 2015-2016) kun duon- aŭ tuttagaj ekskursoj;
  - AŬTUNE, fine de oktobro (ekde 2012) kun kursoj kaj programo por infanoj;
  - Jarfina Festego, fine de decembro (2010-2012, 2014), kun Silvestra Festeno.
- Estas impona listo, ĉu? Kaj Greziljono gastigis ankaŭ aliajn renkontiĝojn. Inter ili estis, ekzemple, la fama FESTO – Franca Esperanto-Semajno Terure Organizita. Ĝi estas junulara Esperanto-renkontiĝo, organizata ĉiujare de Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO). Aŭ FRINGoj, infanaj renkontiĝoj, kiuj pasis en printempoj. Gastigis la kastelo ankaŭ interesaciajn Esperanto-kongresojn



(por komencantoj, por meza nivelo, por progresantoj). Gvidas lecionojn kutime tre spertaj kaj famaj en Esperantujo instruistoj. Post serioza lernado partoprenantojn atendas aliaj aktivaj: prelegoj, spektakloj, kulturo kaj arto (teatro, kantado, pentrado, dancado, poezio, filmo). Por iom majstriĝi oni organizas manajn atelierojn: libro-bindado, masaĝo, manlaboroj por infanoj kaj alajn. Ne mankas, certe, sporto (tabloteniso, flugpilko) kaj tre diversaj ludoj. Inter ili estas: societa tabloludo, ŝako, glob-ludo

KEFO-jn, kaj famajn REF, Renkontiĝojn de Esperantaj Familioj.

La aranĝoj en la kastelo estas variaj laŭ sia temaro. Inter ili povas esti tute seriozaj kaj imponaj. Ekzemple, en 2004 kaj poste ekde 2009 ĝis 2016, en la kastelo okazis Somera Universitato de EDE – Eŭropo – Demokratio – Esperanto. EDE estas politika movado, kiu deziras pere de Esperanto plibonigi la komprenigon kaj plifortigi la demokration kaj plurlingvecon en Eŭropo. Kaj dum 5 jaroj en Greziljono ekzerciĝis... junaj matematikistoj – dum tiel nomata Animath, la prepara staĝo por Internacia Matematika Olimpiado.

Do, vere jam eblas konsideri Greziljonon kiel modelon de internacia kaj interkultura centro kaj Esperanto-centro.

Eble iuj el niaj legantoj partoprenis iam la renkontiĝojn en la kastelo Greziljono? Tiam ili povas konfirmi, ke la programoj ĉiam estas abundaj, sciindaj kaj amuzaj samtempe. La organizantoj strebas kontentigi la plej diversajn gustojn kaj preferojn. La kerno de ĉiuj renkontiĝoj kutime estas Esperanto-kursoj en du aŭ tri niveloj

Boule de fort, turisma malkovro (urbo Baugé kaj ĝia regiono, reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro) ktp.

La kondiĉoj en la kastelo estas sufiĉe modernaj kaj oportunaj. Greziljono disponas pri 25 dormoĉambroj kun ĉirkaŭ 60 litoj. La ĉambroj situas ĉe la 1-a kaj 2-a etaĝoj de la ĉefa konstruaĵo kaj en la kromdomoj. Sur apudkastela herbejo oni povas tendumi.

Sud-oriente de la ĉefa konstruaĵo troviĝas du longaj, arkoformaj kromdomoj. En ili troviĝas klasĉambroj, la salono Zamenhof, kiu servas por ekzamenoj, koncertoj kaj prelegoj, bindejo, trinkejo kaj dormoĉambroj por deĵorantoj.







Greziljono havis eĉ propran radiostacion! La kastelo estis la oficiala loko de la kluba radioamatora stacio de “Grupo de Esperanto-Parolantaj Radio-Amatoroj en Francio”. Dezirantoj povis kapti kaj aŭdi ĝin per la voksigno F5KSP. La stacio havis kondiĉojn por elsendi en pluraj elsendmodoj kiel telegrafio, fonio, radioamatoraj satelitoj, SSTV, PSK31 kaj aliaj elsendmodoj. Bedaŭrinde, moderna mondo ne abundas je radioamatoroj. Eble iu radioamatoro iam ree uzos la voksignon de Greziljono.

En Greziljono oni organizas ankaŭ volontulajn tagojn. Plurfoje jare okazas semajnfino aŭ tuta semajno por laboremaj homoj. Volontuloj plibeligas la eksteraĵon, plibonigas la komforton en la ĉambroj, riparas aŭ novigas ĉion necesan, preparas somerajn semajnojn.

Se vi volas ekscii pli pri la kastelo, vizitu ĝian paĝaron <https://gresillon.org>, aŭ Esperantan vikipedion: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo\\_Greziljono](https://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo_Greziljono). Tie vi trovos planan kaj detalan informon pri la kastela vivo kaj multajn aliajn tre utilajn konojn. La Kastelo havas siajn paĝojn en diversaj sociaj retoj: <https://www.facebook.com/groups/greziljono>. Ekzistas ankaŭ aliaj informaj fontoj, kiujn vi facile trovos en la Reto.



Do, bonvenon, karaj legantoj! Ĉiuj trovos por si mem ion interesan, pozitivan kaj utilan dum la okazaĵo en la Kulturdomo de Esperanto Kastelo Greziljono. Se vi ŝatas studi, utile kaj samtempe amuze pasigi somerajn aŭ alitempan feriojn, nepre venu al Francio kaj Greziljono! Esperanto en interkultura etoso atendas vin!

La artikolo estas kompilita pere de la materialoj ĉe la paĝaroj <https://gresillon.org> kaj <https://eo.wikipedia.org>, danke al sinjoro Bert Schumann, membro de la Administra Komitato de Greziljono.

### Sekvaj eventoj:

**2019-dec-28 / jan-01** Jarfina FESTego kaj Silvestra novjara FESTeno laŭ franca maniero, kun kostumbalo

**2020-apr-17/25** 10-a PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut

**2020-apr-24/25** 10-a PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj

**2020-aŭg-11/08** 49-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto en la urbo Montrealo, Kebekio/Kanado.  
Retejo: [bertosch.free.fr/iik2020](https://bertosch.free.fr/iik2020)





Mireille Grosjean

# Hector Hodler


## – junulo kun diversaj talentoj

**La patro, Ferdinand Hodler, estis fama svisa pentristo. La filo, Hector Hodler, naskiĝis en 1887, en la sama jaro kiel Esperanto.**

**L**i devis ofte stari aŭ sidi en la ateliero, la laborĉambro de sia patro – kaj resti trankvila, pozi, dum la patro pentris lin. Dum tiuj longaj horoj li pripensis. Iam li trovis en sia hejmo la unuan libron de Doktoro Esperanto. Li komencis lerni tiun strangan nekonatan lingvon. En sia lernejo en Genevo li konatiĝis kun Edmond Privat, kiu estis du jarojn pli juna. Privat skribis: “Kiam mi dekdujare eniris la gimnazion, mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj kaj senordaj brunaj haroj, kronantaj lian belan grekan frunton. Silentema, trankvilema, kun sentema koro kaj fervora animo.”

Privat foje salutis Hector en Esperanto, kaj Hector respondis. Do ili sciis, ke la alia ankaŭ lernas tiun lingvon. Ili komencis inter si uzi ĝin kaj tiel rapide progresis. Ili decidis krei gazeton kun titolo *La Juna Esperantisto*. “La redaktejo estis sur la lernejoj benkoj, la presejo kaj bindejo sub lavitaj tukoj en la subtegmentejo de la domo de Edmond.” (El Ulrich Lins *Utila Estas Aliĝo*, p. 56)

Edouard Stettler pri Hector Hodler: “Neniam lerninte la agrablan arton de konversacio, li restis eble plej malproksime



de ĉio, kio nomiĝas salono, invito aŭ festo. Multaj vizitintoj de la oficejo tial ne havis de li la veran impreson, kelkaj nur tiun, ke la Direktoro forestas. Intertempe Hodler estis forkurinta en sian ĉambron aŭ en kafejon, tie ellaborante artikolon, kiun, revenante, li gaje elteris el unu el la sennombraj poŝoj de sia surtuto (mantelo), ĉiam ŝarĝata je papero kiel rondiranta librejo.” (El Andy Künzli: *Universalaj Lingvoj en Svislando*, p.394)

“Sian laboremon kaj ekkolereman temperamenton Hodler havis de la patro, supezeble ankaŭ el la patro gento herediĝis la terura tuberkulozo, tiom devastigita en nia lando. De la patrino devenis la natura delikateco, kvazaŭ neinstruita bonedukiteco, kiu kontrastis kun lia pli ol simpla, okaze nezorgita eksterajo (aspekto). Dum sia malfeliĉa juneco li lernis suferi, observi, silentante. En la 11 volumoj de nia korespondado, troviĝas simplaj aludoj je operacioj kaj senkulpiĝoj, kial li ne povis labori, sed neniu plendo, neniu riproĉo.” (El Anky Künzli: *Hector Hodler, lia vivo, lia verko, lia patro*, CDELI, p. 13).

La arto de Hector Hodler estis ligi pensadon kaj efikon. Ligi la ideon de Zamenhof al strukturo, doni vertebraron al la Movado, kiu komence estis ia amikaro ĉirkaŭ Zamenhof, la majstro. Hector proponis, ke estu en plej multe da landoj konsuloj, kiuj poste nomiĝis delegitoj. Tiu reto ankoraŭ ekzistas hodiaŭ. En 1908 li fondis Universalan Esperanto-Asocion: UEA.

Privat kaj Hodler estis junaj. Ili invitis kaj organizis la duan Universalan Kongreson en Genevo, Hector estis 19-jara, Privat estis 17-jara. Zamenhof inventis la strukturon de la lingvo Esperanto, kiam li estis 14-jara! Geniaj junuloj!

Hector suferis pro tuberkulozo, grava malsano, kiu venkis lin en 1920, kiam li estis 32-jara. Pro tio ni pensos pri Hodler kaj lia agado en 2020.

(Verkita por *Juna Amiko* kaj [www.uea.facila.org](http://www.uea.facila.org))



Renée Triolle

# Marie Marvingt (1875-1963)

**Kiu el vi konas la nomon de tiu francino? Supozeble neniu. Tamen ŝi estas la unua virino, kiu sukcesis en pluraj kampoj. Ŝi ŝatis riskon, lukton kaj strebadon, praktikis multajn sportojn, iĝis piloto kaj iniciatis sanitaran aviadon.**

## Juneco kaj formado

Ŝi naskiĝis la 20-an de februaro 1875 en Aurillac, suda Francio. Kiam mortis ŝia patrino, ŝi estis 14-jara, transloĝiĝis kun la patro al Nancy en orienta Francio, kaj dungigis kiel servistino. Tio ne bremsis ŝian emon plu studi dum la tuta vivo: ŝi iĝis flegistino, sukcesis pri beletro, konis 5 (7 laŭ aliaj fontoj) lingvojn, inter ili Esperanton, studis juron kaj psikologion, laboris kiel ĵurnalisto, poeto, verkisto, eĉ pentristo kaj skulptisto!

## Sportoj

Nur 5-jara ŝi naĝis 4 kilometrojn kaj 15-jara ŝi remis kanue 400 km laŭ la Rejno iinter Nancio kaj Koblenco. En 1905 ŝi estis la unua virino, kiu tranaĝis Parizon. En 1908 ŝi kandidatiĝis por aliĝi al la sporta bicikla rondiro tra Francio. Rifuzita, ŝi tamen biciklis laŭ la sama itinero ekster la oficiala konkuro. Dum la vivo ŝi praktikis 35 sportojn i.a. naĝadon, skiadon, rajdadon, bokson, karateon, tenison, golfon, skermon, speleologion, plonĝadon, alpismon. Multaj estis riskaj sportoj, sed ŝi ĉiam ŝatis riskon: infanaĝe ŝi studis en


cirka lernejo kaj trejniĝis ĉe trapezo, sekursnuro, ŝnurdanco.

## Piloto-virino

En 1899 ŝi estis inter la unuaj virinoj, kiuj sukcesis kaj ricevis permeson stiri aŭton.

Ŝi estis la sola virino kun 4 rajtigiloj pri pilotado de balono (1909), aviadilo (1910), hidroplano (1910) kaj en 1955 kiel 80-jara – helikoptero! En 1910 ŝi estis la unua virino-piloto, kiu flugis per aerŝipo de Nancy al Britio. Ŝi tiam havis la ideon pri sanitara aviadilo, kunligante sian amon al pilotado kaj profesion de flegistino. En tiu epoko ŝi ricevis diversajn kromnomojn: “Maria kolrompemulo, Reĝino de l’Aero, Senlaca Mondvojaĝulo”.

Komenciĝis la unua mondmilito en 1914: Maria sin proponis por piloti aviadilon, sed ŝi ne estis akceptita kaj servis kiel flegistino ĉe la fronto. Danke al la helpo de leŭtenanto ŝi ŝajnis, ke ŝi estas viro, por batali en la tranĉeoj – sed la ruzo estis malkovrita. Danke al la interveno de altrangulo, ŝi ricevis mision revenigi vunditajn soldatojn. En 1915 ŝi estis honorigita per medalo “Militkruc” (dum la tuta vivo ŝi ricevis 34 medalojn).



## Postmilita lobiado

Post la unua mondmilito ŝi vojaĝis tra la tuta mondo, prelegis pri sanitara aviado por konvinki la ŝtatojn uzi aviadilon ne nur por bombi, sed ankaŭ por savi vivojn (okaze de bataloj, sed ankaŭ de tertremoj, akcidentoj aŭ katastrofoj). En 1935 ŝi estis la unua virino, diplomita kiel aerflegisto. Dum la milito en Alĝerio ŝi estis ĵurnalisto en Nord-Afriko, produktis du dokumentajn filmojn.

Tiu elstara virino, kiu 86-jara biciklis inter Parizo kaj Nancio (pli ol 300 km) kaj revenpilotis helikopteron, estis komplete forgesita.



Derek Roff

# AMO refoje gastigita de NASK en Usono

La 57-a seminario de Aktivula Maturigo (AMO) en Raleigh, kunlabore kun Kino-Teatro-Festivalo (KTF) kaj Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), kunigis la plej grandan grupon de partoprenantoj kaj gvidantoj en nia historio.

**N**i atingis cent du homojn; la aĝoj variis de malpli ol 8 jaroj, ĝis pli ol 80, kun tre kontentiga kvanto da junuloj. La elcentaĵo de virinoj kreskas; afero bona kaj grava en Norda Ameriko.



Ni videble sukcesas bonvenigi pli grandan kvanton de ne-duumaj (ne-binaraj) kaj ne-blankulaj partoprenantoj, kaj pri aliaj aspektoj de diverseco, sed restas multo por fari. Pli ol duono de la partoprenantoj raportis, ke ili almenaŭ parte lernis per Duolingo, kaj ni havis plurajn diskutojn pri kiel plibonigi la kurson, kaj kiel interesi pli da Duolingo pri lokaj, regionaj kaj naci-skalaj Esperanto-arangoj. Duncan Charters kaj Tomaso Alexander gvidis specialan seminarion pri instruado ekster la tradiciaj klasĉambroj kaj kuntekstoj. Chuck Mays tuj elsendis





en NASK, por dokumenti tiun aspekton de nia historio. Intertempe ni dividas spertojn kaj teknikon registri sonojn, fari filmojn, kaj reĝisori tiujn kaj similajn aranĝojn. Vespero por spekti kaj diskuti filmojn allogis multajn partoprenantojn.

Ni vidis du mallongajn filmojn, kiujn kreis membroj de nia grupo. Unu traktis kunsidon ĉe UN kun TEJO kaj aliaj junulaj organizaĵoj. La ĉefa filmo de la vespero estis la plej nova de Natalie McMahon, kiu traktas konflikton inter tiuj, kiuj subtenas amon (kaj Esperanton), kaj registaro, kiu taksas tion, 'Malsano Nomita Amo'. Ni finis per aliaj mallongaj filmoj, faritaj de esperantistoj el diversaj landoj.

Plia temo estis kiel komuniki kaj allogi homojn al la Universala Kongreso en Montrealo, Kanado, en 2020. Novaj ideoj kaj sugestoj aperis.

(Koncizigita de Stefan MacGill)

grandan parton de tiuj prezentoj, kaj Alex Miller afiŝis filmetojn dum kaj pri okazaĵoj ĉi tie.

Estis la 50-a datreveno de NASK. Ni havis prezentaĵon pri la historia evoluo de la kursaro kaj alia, specife pri la ŝanĝiĝoj en lingvoinstruado. Ni registras la memoraĵojn de iuj, kiuj antaŭe ĉeestis

## Pretiĝas nova forumo por UEA-membroj

**R**esponde al la alvoko, publikigita en *Gazetara Komunikilo* n-ro 769 de UEA (la 4-an de decembro 2018) krei novan retan kunlaborejon por nia membraro, alvenis kvar kandidatigoj.

Post intensaj diskutoj kaj analizoj pri la bonegaj kvar proponoj, la Estraro decidis favore al la propono de la brita esperantisto Tim Owen, kreinto de la nova retejo de UEA *uea.facila* (legu en *Juna Amiko* 1/2019, p. 27) kaj kunaŭtoro de la nova lernolibro pri Esperanto por anglalingvanoj *Complete Esperanto*.

Origine ni planis lanĉon de la nova forumo jam post unu monato da laboro. Tamen intertempe Tim Owen proponis al Emiljo Cid, la estrarano pri informado, aldoni


pliajn funkciojn, elektitajn el inter la plej utilaj kaj modernaj rimedoj, nun uzataj en bonaj retejoj. Tiujn aldonajn funkciojn li pretas prilabori volontule. UEA konsentis pri tiuj aldonaj proponoj kaj rezulto videblas ĉe <https://forumo.uea.org> – kaj vi povas tie skribi kion vi opinias, resp. kiel plibonigi ĝin. La nova forumo estas tute moderna. Eblas uzi ĝin egale per poŝtelefonoj kiel per komputiloj,



registriĝi kaj ensaluti per Facebook, Google kaj Twitter, "ŝati" kaj "malŝati" afiŝojn, kio servas por montri per poentoj la plej bonajn komentojn kaj afiŝintojn, kaj multe pli. Ĝi estas grava paŝo en la ĝenerala administra modernigo de UEA, kiu restas prioritata por la nuna Estraro. (GaKo)

# Dulanda kongreso en Oceanio

La rubrikon prizorgas:  
Stefan MacGill



En januaro 2020 okazos komuna kongreso por la esperantistoj de Nov-Zelando kaj Aŭstralio, plus pliaj vizitantoj el la regiono Oceanio, plus el la cetera mondo.

Jam de jaroj Nov-Zelando kaj Aŭstralio okazigas komunajn Esperanto-kongresojn, lastatempe ankaŭ kun Indonezio. La kongreso okazos en Aŭklando, la plej granda urbo de Nov-Zelando. La kursgvidantoj en tiu kongreso estos la usonano Duncan Charters kaj la hungariano Stefan MacGill. La kongreso enhavos la seminarion de Aktivula Maturigo (AMO) numero 62 kaj la tradician someran lernejon de Aŭstralio. Memoru, ke en la suda hemisfero januaro troviĝas meze de somero.

Sube kaj apude mi prezentas 14 faktojn pri la du landoj – Nov-Zelando kaj Aŭstralio. Sed iuj el ili estas veraj kaj aliaj neveraj. Decidu pri ili kaj atendu la sekvan numeron de *Juna Amiko* por la ĝustaj respondoj. En kelkaj demandoj aperas pri bestoj la vortoj “en la naturo”. Tio signifas, ke la bestoj vagas libere kaj estas kapablaj moviĝi laŭplaĉe – do ne en besto-ĝardenoj aŭ besto-butikoj. La frazoj ĉiam faras komparon inter la du landoj.

1. En ambaŭ landoj la ĉefurbo ne estas la plej granda urbo.
2. En ambaŭ landoj multegas personoj, kiuj fanatike subtenas rugbean futbalon.
3. Ambaŭ landoj havas enormajn kvantojn da karbo.
4. Ambaŭ landoj havas multajn kanguruojn, kiuj vivas en la naturo.
5. Ambaŭ landoj havas danĝerajn serpentojn.
6. Ambaŭ landoj havas danĝerajn ŝarkojn.
7. Ambaŭ landoj havas valabiojn vivantajn en la naturo.

8. Ambaŭ landoj havas Landan Asocion de UEA.
9. Ambaŭ landoj havas cervojn kaj kuniklojn, kvankam ne indiĝenajn.
10. La indiĝena popolo de ambaŭ landoj alvenis al la lando antaŭ ĉ. mil jaroj.
11. Ambaŭ landoj spertis or-febron en la 19-a jarcento.
12. Ambaŭ landoj havas multajn personojn, kiuj komprenas, ĝuas kaj ludas kriketon.
13. Ambaŭ landoj pionire frue donis al virinoj voĉdonrajton.
14. En ambaŭ landoj oni paŝtas multegajn ŝafojn.
15. Ambaŭ landoj suferas tertremojn.

## Vort-listo


**Oceanio:** Aŭstralio, Nov-Zelando plus milo da insuloj kaj insuletoj en la suda parto de Pacifika Oceano. **Fanatike:** fervore, kun granda entuziasmo. **Valabio:** Specio simila al kanguruo, sed malpli granda. **Cervo:** Besto kun kornoj. **Indiĝena:** Apartenanta ĉiam aŭ delonge al teritorio. **Or-febro:** amasa kuro al loko, kie oro estis malkovrita, pro la deziro rapide riĉiĝi. **Kriketo:** Komplika ludo kun solida pilko, ses stangoj kaj dudek du ludantoj. **Paŝti:** Konduki brutojn, por ke ili manĝu herbon.

	K	E	B	E	K	I	O	
		T	E	N	O		V	E
M	O	N	T	R	E	A	A	L
O		I		T		L	I	
V	A	N	K	U	V	E	R	
D	E	C	O		M	A	T	O
A	T	E		A		L	A	N
T	O	R	O	N	T	O		T
O	N	O			T	E	N	T



## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*


**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnický@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson; *esperanto.ee*. **Finlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperanto-france@esperanto.org.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartado 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *silkovojo@aliceposta.it*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@xtra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *sten@agado.net*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch\_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.officejo@gmail.com*.



Se ĉiu homo ŝiros  
belajn florojn, baldaŭ tute  
ne restos belaj floroj!



Ĉiu homo...



Mi ja ne estas  
homo! Mi povas re-  
bonigi ĉion...



Verŝajne, estus pli  
bone, se ĝin revivigus  
vi...